

PENSEO

N-ro 401

marto / 2025

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 36-a jaro <http://www.esplerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Nia beletra ĝardeno

Jen pensoj en ĝardeno nia,
kun aromo de beletra ĉarmo.
Ili pimpas kun belec' huria,
okulplaĉaj je kortuŝa varmo.

Pioniras ĝardenisto Vejdo,
sindonema kaj rikoltoplena.
Kunlaboras ni je glor-avido
por l' ide' komuna esper-bena.

Alte for sin sternas la ĉielo,
ĝis l' Edeno bela kaj beata.
Brilas helflagrante l' verda stelo
super nia fronta voj' benata.

La Penseroj floras en fervoro,
E-kulturo pompas kun la gloro.

Amo estas pli forta

Vi revenas en la sonĝon glite,
kun ridet' konata ja tiama.
Ŝajne temp' regresas mir-subite,
ni re-dronas en delico ama.

Sur la holm' aromas jen gazono,
ni brakume flustras kor-pasie.
Tempo haltas tiam kun sindono,
min memor' obsedas nostalgie.

Mi vekiĝas el la sonĝ' ĉagrene,
kaj konscias, ke vi ne plu estas.
Pli ol kvardek jaroj pasis ĉene,

vi delonge en l' edeno restas.

Estas am' pli forta ol la morto,
flegma restas mi al fata sorto.

Spiro de Printempo

Ho printempo estas jen veninta
Brizo freŝe lantas tra l' arbaro
Ĵus vekiĝas Tero ja mirinda
Mevoj ŝvebas vigle sur la maro.

Delikatas rozoj kaj violoj
Spiro de printempo bonodoras
Abelaro zumas inter floroj
Birdoj sur arbpintoj dolĉe ĥoras.

Nin salutas lumo primavera
Blankaj nuboj flirtas sur ĉielo
Verdas la kamparo tuj prospera
Sorĉas nin printempdiina belo.

Mondo nova helas kun aspiro
Homoj plenesperas per inspiro.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Penseroj

Veturad' en la urbego,
en premanta busa grego
estas longa kaj enua.
Sed apuda ĉarmulin'
elokvente okulumas
miajn ŝuojn. Ve, ne lumas
respegulo en la ŝuoj,
hontigantaj, certe, min.

Kara, mi demandu : - Ĉu al
vi ne plaĉas miaj ŝuoj?
Jes ja, ilin kovras koto
pro kapricoj de l' veter'.
Sed ne estas mia kulpo –
malstreĉiĝu la okulo
por atenti verajn trajtojn
de la vira karakter'.

Post konstat' de propra miso
eble venos via kiso
al la nerazita vango
de l'amindumanta ul'.
Sed se ne permesas prudo
kisi min, mi diru: - Nu do
restu ĉe la kotaj ŝuoj
ĉi-okaze la okul'.

Mi konscias, ke nun
post la viv' duonplena
staras mia fortun'
inter "se" kaj "apenaŭ".
Mi konscias, ke hor',
forpasinta malŝpare
en ĉagren' aŭ amor',
evitendas avare.

Serĉas klavojn la man',
forte frapas ondar' de
la animocean',
kaj elplaŭdas plene
al ekrana blanket'
rimoj, kiujn prirevas
mi, sed scias mi, ke
ĉion ĉi mi ricevas

el la plag', el plezur'
el la vivo plej simpla
el la svaga forkur'
de l' horeto pasinta.
Do, mi ploras kaj amas
kun ĉagren', kun kares',
kaj fortune ekrampas

de "apenaŭ" al "jes".

2003

La peterburga plenluno
kaj la fumeta mateno
min inspirigas en nuno.
Mia destina faden
foje direktas la vivon
mezen de l' brua urbego
por la tumulto ekdriv' en
ĉiam gastanta hom-grego.
Eble en hastomanio
flame flirtema fortune
venos kun nova linio
por poemet' pri l'plenluno.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Nur vizaĝoj...

Vizaĝoj, ŝajnas nur vizaĝoj,
Diversnacia nia mondo,
Ne gravas, junaj aŭ aĝaj
Samideana granda rondo.

Kaj pentras mano tre fervore
Talente, bele kaj tutkore
Ridet, demand', kaj pripensado
Vizaĝ' kiel anima "mapo".

Pentrista man' aldonas lumon
Ĝi ofte mankas en la vivo,
Krajono, penso, vorto, plumo
Kuniĝ' de vera pozitivo!

Bagatelaĵo- iuj diros,
Pri vort' sincera, ve, avaras,
Ne ĉesu ni en viv' admiri
Bonec' de koroj ĉiam pravas!
Mi ĉiuvintre "mendas" la pentraĵon
Glaci' sur branĉ', frostitaj larmoj,
Kaj la beleco tiu nur portempa
Kiel kurteno diafana kaj malvarma.
Pentraĵ' degelos post monato,

Sen plend', kviete kaj senmove,
 Se ni ĝisvivos la venontan vintron
 Pentraĵon mendos mi denove.
 P.S. Kion fari, belega glacio
 nin devigas rakonti pri vintro,
 Novaj strofoj de la poezio
 Kiel spiro frostita sur vitro.

Fabele la neĝeroj flugas
 Kiel memor' pri infanec',
 Domet' de niaj revoj karaj
 Sopir' kaj ĝoj' el pasintec'.

Kaj se malfermos ni la pordon,
 Pli la lumbril' ekmiros ni
 Aŭ pri miraklo de feliĉo,
 Kiu degelis iam kiel la glaci'.

Fabele la neĝeroj flugas
 Kiel memor' pri infanec',
 Domet' de niaj revoj karaj
 Sopir' kaj ĝoj' el pasintec'.

Kaj se malfermos ni la pordon,
 Pli la lumbril' ekmiros ni
 Aŭ pri miraklo de feliĉo,
 Kiu degelis iam kiel la glaci'.

Ángel Arquillos (Hispanio)



La vivo nuda

La vivo senvestas,
 kaj ĝi tute nuda
 de longe forestas.
 Mi sentas kun timo
 en aĉa rifuĝo
 pri mia kulmino,
 kaj mi daŭre pensas
 pri mia destino
 kaj mi daŭre sentas
 ke antaŭ la fino,
 ie ajn atendas

la vivo senvesta.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Indiferenteco

Varmega januara mateno.
 Ĉe malfermita pordo
 de bankoficejo,
 malĝojokula hundo ĝuas
 la lukson de klimatizilo.
 Ekstere, senhejma paro
 dormas profunde,
 kovrita per polvo
 de la brulanta suno.
 Neniu zorgemas.

Juiz de Fora, 27/01/2025.

Marzena Wawrzyczkova (Pollando)

"ni ankoraŭ ludas verda"

okuloj ankoraŭ dorme fermitaj
 mi lasas la sonojn de birdoj vivi en mi
 la tago vokis la vorton de verda
 vigla, malpeza kaj bela
 kafaodoro en la plej bona taso
 pli klara vido de la ĉielo ĉiutage
 korpa feliĉo, kio ne haste
 ĝi sentas dankema esti viva

Josip Pleadin (Kroatio)



Ho, kajto, mia

kajto...


Ho, kien vi flugas kajto, mia povra kajto,
 al kiu blanka nuboj, al kiu mistera cel'?

Kie liber' senŝnura, senbrida flugorajto
 por via valsbalanco en puŝa ventoza pel'?

Per forto magia se kondukas vin feino,
 per navigo sekura, sen truda molestbalast',
 se delikate blanka kaj aminda ĝufino
 atendas vin ĉielalte – pro kio via hast'?

Jam ŝnuro eluziĝis, ne tenas vin solide.

Balance virtuozas vi en venta bravuro.
 Kiel Ikaro vi flugas senzorge, memfide,
 en virga mortoflugo jen lasta aventuro.
 Ho kajto, mia povra kajto, vanas kuraĝo,
 se propraj flugiloj ne povas porti vin mem!
 Ni haltis en frua kaj trista infanaĝo.
 Sen via morto ne estus verkita ĉi poem'.



Eugene Khvalkov (Rusio)



En rigardo, en rideto, en tuŝo,
 Kaŝas la magio de amo, kaŝita.
 Ĝi transformas la mondon en loko de ĝojo,
 Kaj ni lasas nin senti la miron de vivo.

Amo estas la plej granda magio,
 Kiu donas al ni flugilojn kaj kondukas nin al
 novaj marbordoj,
 Ĝi lasas nin vidi la mondon per aliaj okuloj,
 Kaj malkovri la magion en ĉiu momento de vivo.

En nokto sub lunbrilo,
 la stelaro dancas senhalte—
 magio en la aero,
 kanto de l' unu vespero.

Kun sorĉo kaj susuro,
 la arboj parolas al mi,
 pri sekretoj de l' antaŭmondo,
 kaj forgesitaj tempoj.

Per luma spiro de vento,
 la magio en ĉiu movo,
 kreskas kaj velkas—
 la ĉarmo de la noktstelo.

En polvokovrita vualo
 de la sorĉa libro kovrita,
 estas vortoj en koloroj,
 sed ne vortoj de tiu ĉi mondo.

La paĝoj sin lumas
 per magia skribmaniero,
 kaj vortoj danĝeras, ĉi tiuj vortoj
 enhavas potencon kaj energion.

Rakontoj de steloj kaj lunoj,
 de sorĉistoj kaj sorĉo,
 sur la papero danĝeras,
 kaj brilas kun magia lumo.

Kiam la luno altnoktas,
 kaj la steloj rigardas,
 la arboj komencas dancon
 kun vento kaj magio.

Kaj la folioj murmuras
 sekreton de la arbaro,
 kun ĝojo kaj miro,
 la danco daŭras sen fino.

La tero kaj la ĉielo,
 la homoj kaj la spiritoj,
 en la rondo de magio,
 ĉirkaŭ la flamo de l' vivo.

Sub luno kaj sub steloj,
 en la silento de la nokto,
 bruas la sorĉa kaldrono,
 plena de magia potenco.

Kun herboj kaj kun radikoj,
 kun lumo de la fajro,
 miksiĝas kaj fandiĝas
 la sekreto de l' universo.

Kantado de l' antaŭaj tempoj,
 lumo de la stelaro,
 fluas en la kaldronon,

sorĉan kaj senarbaran.

Blazio Vaha (Hungario)



Adasisme

kompromisaj strofetoj

Oni diras al mi iam:
 ci ja kompromisas iam,
 ĉu vi kompromisas ĉiam?
 Mi informas onin, iam:
 Jes, mi kompromisas iam,
 sed pro kompromis' -- ne ĉiam.
 Kompromiso estas misa.
 Ĉu mis-kompromiso, bisa,
 estas pli aŭ malpli misa?

Jadranka Miric (Serbio)



Nebuliĝo

Blankeca netrasidebla kovril'
 okazis frumatene en altaĵo, sur bieno.
 Ĉiu estis deprimita pro tia densa kurteno
 krom vilaĝa virkoko pave paŝanta al forĵetita
 lulil'.
 En la angulo de l' korto de tiu bieno
 troviĝis alta akacio sub kies branĉar'
 staris malnova kokinej'. Sub nebula mantelo
 ĝi aspektis kiel ia granda azeno.
 Ekbalanciĝis virkoko. Kiu estas tiu ulo?
 Rigardante en nenio ĝi miris: Nenifarulo?
 Kiu perdis sian vojon? Time sed forte
 ekkokerikis ĝi.
 Resonis la kokeriko eĥe. Aperu vi, tie ĉi!
 La virkoko kriaĉis laŭte
 batante sian bruston daŭre kokerikante,
 dume la bienulo atingis bienon aŭte.
 La virkoko senĉese preskaŭ flugis de loko al
 loko.
 Je la dek unua aperis suno.
 Ĵus ekvidinte la kokinejon ĝi
 falŝanceliĝe hontigita apenaŭ kokerikis,
 La tuta kokinej' gaje ekklukis.

Multe da amo kaj sano

Ĥristanaj festoj okaze de Sanktuloj
 SanktaTribuno* kaj Sankta Valentino
 estas festataj sincere tra la tero
 de ĉiuj homoj tutkore.
 Salutas ni unu la alian mildkore !
 Estu poreterne amo savita!
 Estu ĉiu vinbero benita!
 Neniam travivu la tervivon sen amo !
 Neniam perfidu la esencon de ĉies kredo!
 Eltrinku vi glason da vino, vi amfeliĉuloj!
 Ebriiĝu vi enamiĝontoj!!

**Sankta Tribuno estas ortodoksa sanktulo batalanto
 por familio kaj geedziĝo. Li estas protektanto de
 vinberistoj. Li estas festanta ĉiam je la 14a de
 Februaro .*

Foiro en arbar'

Kolektiĝis el la fora arbar'
 ĉiuj bestoj laŭ sia potenco kaj grandeco,
 Leono prezentis sin kiel reĝo de ĉiu bestoj el
 Best-Mondo.
 "Aŭdu min, ho bestar'! Atendas nin kruela
 batal'!
 Mi gvidos vin kiel ĉiam ĝis nia venko!"
 ekhurlis li.
 Meze de la rondo el la lasta benko
 kaŝita de arbustro aŭdiĝis bovoobleko,
 "El mia rondo neniun rezistu!"
 "Venos kun ni kuraĝaj aproj!"
 la granda apro laŭdis grunte siajn apridojn .
 Dume serpentoj kuŝis trankvile en la herbejo.
 Ŝajnis ke ili ĝuis la sunon penetrantan la
 arbaron.
 Venis vico de Leporo alparoli. Li estis ege
 timanta.
 Liaj ruĝaj okuloj pli ruĝiĝis, kaj lia bleko estis
 mallaŭta
 kvazaŭ li estus je la rando de ploro:
 "Ni estis la plej rapidaj bestoj.
 Do, ni staros malantaŭe proksime de Anserara
 Lernejo."
 La ruza vulpino riproĉis, "Ne mi estos tie. Mi

gardos ilin!
 Ili faros ĉion laŭ mia ordono!"
 Ĉion aŭskultis multkolora virkoko.
 Iomete pavparade li eksataris antaŭ ili
 kokerikante.
 "Kiu vin vekos ĉiu matene antaŭ sunaperado?
 Se necese mi kokerikos dufojojn matene kaj
 vespere. Konsentite?"
 Ekestis bruada respondo.
 En tiu momento alflugis la blanka dukapa
 aglo.
 De ie al lia direkto ekflugis du korvoj.
 "Kion ili celas? Kia ĥaosa situacio regas
 sube."
 Tra arbaro ekis kriaĉado miksiĝanta kun
 bojado kaj hurlado.
 Dume iuj bestoj laciĝis, iuj malĝojiĝis, kaj iuj
 brue disiĝis.
 Post unu semajno la arbara griza vulpo provis
 konvinki la bestaron.
 "Ni ĉiuj devas singarde reveni al la antaŭa
 stato,
 eĉ vi el fora bosko aŭskultu nin.
 Ni bezonas pacan kunvivadon.
 Ni pace obeu la arbaran juron!"
 Subite de ĉiuj flankoj ekis forta grakado,
 "Vi malfruis. Revolucio jam finiĝis!"

Papos Nascentes (Brazilo)



Poema haŭto

Mia haŭto vian haŭton frotas
 — kia kulturejo!
 mia plant-kulturejo vin agitas
 hirtigas vian haŭton reprogramas la tempon
 mem:
 amo, inspiron mi havis
 por nia apartamento
 tiu kiu supozu disputon kiu supozu konflikton
 ŝajnigu, ke ne gravas nin ne apartigu
 mi malfaru apartigojn limojn murojn
 tempo kontraŭe sin turnas

la amo estas mia plugo
 disfosas vian silenton el ĝi eltiras tiun vorton
 kiu ŝvita elfluas el la poema haŭto
 agitiĝas skuiĝas tremas kaj kalma silentas
 kaj el la haŭtofrotado eksplodas kalmon
 kaj elĵetas poezion kaj elspiras tion
 kion mi diras kaj mia eldiro
 la monton de l' silento grimpas
 kaj sur via supro diras forte la faluso
 kaj via kareso, la lumo kie mi silente dormas

Erika Godó (Hungario)



La geĵŝo

Kun etaj piedoj kaj infanaj paŝoj,
 la geĵŝo marŝas milde, mallaŭte.
 Kun brilaj haroj, misteraj okuloj,
 sub la perfekta masko larmoj falas.
 Bonodora varma teo estas preta,
 sed ŝia vizaĝo glacie malvarma.
 Dum la kordoj de gitaro mallaŭte sonas,
 belaj melodioj flugas en la vento.
 Kantoj temas pri amo kaj sopiro,
 dum nur soleco vivas en ŝia animo.

La paso de la tempo

Tagoj pasas, noktoj venas,
 memoroj vivas, en ni sin tenas.
 La paso de la tempo, kiel vento,
 en la koro restas nur kontento.
 Ĉiu horo, minuto, sekundo,
 konstruas historion, en nia mondo.
 La tempo portas vin sur flugiloj,
 memoroj vivas, dolĉaj stiloj.
 Do ni ĝoju, en la nuna momento,
 la tempo estas donaco, ne lento.

Februaro

Februaro pentras glacifloron,
 neĝeroj dancas sur branĉaro.
 Vento blovas kun spiro malvarma,
 sed en la koro brulas espero sama.
 La tagoj plilongiĝas, lumo revenas,

en koro la varmeĉo pli komenciĝas.
 Floras pensoj kvazaŭ floroj en
 ĝardeno,
 esperoj leviĝas kiel vento en la sereno.
 Vi portas la promeson de printempo,
 en vintro ni revas pri bona tempo.
 Vintro restas kun ni, ne foriras,
 martaj tagoj venas, pli proksimas.

Orkideo

Sekretoj kuŝas inter ĝiaj petaloj,
 delikata beleco brakumita en jovialo.
 Kun buntaj koloroj, blanka kaj purpura,
 ĝi staras en la florpoto, fiera kaj pura.
 Kiel la sunradioj dancas sur ĝiaj floroj,
 en ĝia gracia formo, danco de koloroj!
 Ĝi brilas fiere, kiel valora ĉeno de oro,
 restante plej profunde en mia koro.
 Inter floroj, la freŝa brizo dancas,
 orkideo, kun alloga ĉarmo, romancas.
 Orkideo, vi estas la simbolo de amo,
 nestas en viaj koloroj mia animo.



Pensoj pri tagiĝo

En la ĝardeno ravas la rozoj,
 silueto bluas en la horizonto.
 Lunlumo trarompas la noktojn,
 kiel diamanto en profunda akvo.

Subite lumas steloj en la ĉielo,
 en la animo kaptas miajn revojn.
 Matena brizo, kun milda kaj helo,
 portas esperon, novajn komenciĝon.

Ĉiu tago alportas novajn ŝancojn,
 kiel rivero, kiu fluas senhalte.
 Subite ĝi eliras la sunbrilojn,

la mondo plenas per hela lumo.

Manel Sales (Hispanio)



Sen vortoj

Sen vortoj vi alvokas min,
 per tuŝoj de lumo vintra,
 fulme kiel rideto milda.

Sen vortoj vi alvokas min
 pri la paso de la tagoj,
 kiel flugas sturnaj bandoj.

Sen vortoj vi alvokas min
 per nevidebla fadeno,
 kiu teksas la momenton.

Sen vortoj vi alvokas min
 per floroj, kiuj foriĝos,
 nevideble, Ter' turniĝos.

La vivo nin pentras

La vivo nin pentras
 per strekoj kaj vundoj,
 tuŝoj brilas per lumo,
 linioj teksitaj per koloroj.

Oni nomas ilin sulkoj,
 oni nomas ilin cikatroj,
 oni nomas ilin makuloj,
 ni estas tolo en manoj de l' tempo.

Ĉiu tago – nova skizo,
 nek aĉa, nek maljuna, nek bela,
 nur nia skribaĵo,
 nur signoj de la vivo.

ni estas versoj en haŭto skribitaj,
 ni estas poemoj travivitaj.
 Ni estas Ni! Fieru Ni!



John Huang (Kanado)



La Enigmo Tekstita de

Luno


– Kanto de Ĵuanŝjao (Lantern Festo)
(kantteksto)

Luna lumo teksas enigmon,
Sub verda stelo ĝi brilas.
Dolĉeco de Ĵuanŝjao,
Estas sukceso de saĝeco kristaliĝinta.
Lanternoj balanciĝas,
Enigmaj vortoj dancas en vento.
Kiu flustre rakontas,
La legendojn de jarmiloj?
(Refreno)
Ho, luna lumo, prilumu la solvon,
Lasu saĝecon flori en Ĵuanŝjao.
Lanternoj svingiĝas, enigmoj fluas,
Ni kantas sub la verda stelo.
Enigmo kaŝitas en moviĝo,
Respondoj dise en vento flirtas.
La varmo de Ĵuanŝjao,
Estas la espero fermentita de luna lumo.

Ho, luna lumo, prilumu la solvon,
Lasu saĝecon flori en Juanŝiao.
Lanternoj svingiĝas, enigmoj fluas,
Ni kantas sub la verda stelo.
(Fino)

Luna lumo teksas enigmon,
Sub verda stelo ĝi brilas.
Dolĉeco de Juanŝiao,
Estas sukceso de saĝeco kristaliĝinta.

Elena Popova (Bulgario)



La franda fiŝo

La naĝist' eterna
en la akvo naskita
kaj al ĝi promesita,
nun naĝis silente.

Sed, kun hok' en mane
nun plago lin atendas.
Kriis mi ja vane:
- Fiŝeto, atentu!
La help' malfrua estis,
jam la morto festis...

Galopu, ĉevalo!

Piedfrapas, galopas
ĉeval' senhalte.
Kun vento li vetkuras
kaj barojn transsaltas.
-Piedoj, mi vin petas,
galopu rapide!
Pri fest' mi devas preti-
galopu sen brido!
Vokas min la Ĉevalfest',
venkon pretas mi jesi.
Kantas la tintil': Tin!... Tin!...
Ĉu songe mi venkfestis?

Verdarb (pollando)



Mi estas

Mi estas flameto.
Mi konas suferon.
Mi estas arbeto.
Mi kroĉas la teron.

Mi faras erarojn.
Mi iam ploremis.
Mi suferis de vundaro.
Mi ĉiam kreskemos.

Mi estas sparketo.
Mi flugas tra spaco.
Mi ĝuas viveton.
Mi mortas en paco.

Rozo

Tra feka val' mi paŝis dolore.
Ŝtonoj vundadis miajn piedojn.

La pacon mi deziris tutkore
Sen rajto de iu ajn posedoj.

Laca korpo forgesis ripozon.
Pri dormo sonĝis sekaj okuloj.
Mia vojo trovis blankan rozon
Teksitan el ventoj kaj nebuloj.

Spiradi fariĝis pli facile.
Mi drinkis ŝian lumon senĉese.
Sufero malaperis trankvile.
Ŝia odor' min kisis freneze.

Atroposo

Kiel sonĝo vi al mi venadis
Dum la noktoj dornvepre tempestaj.
Viaj flugiletoj min gvidadis
Al senbruaĵ kaj ŝejoj strignestaj.

Per lunaj radioj vi pavimis
Larmajn kaj kurbajn piedvojetajn.
Via murmureto klareprimis
Filikajn kaj muskajn konsoletojn,

Kiam mi ekaŭdos vian krion,
Rustaj katenoj fariĝos roso,
Mi forlasos lastan iluzion
Kaj flugos kiel vi, atroposo.

Lekanteto

Apud muskoplana kverkarbaro
Proksime al rivero kastora
Norde de granda neĝa montaro
Glimas ŝi nuda en roso ora.

Kie renkontiĝas universoj
Meze de papilia herbejo,
Ŝpinita el burĝonantaj versoj
Sorĉadas ŝi en verda ĉarmejo.

Kaj kiam la suno iros foren,
Malaperos nur ŝia ombreto,

Daŭrigos ŝi vibri multkoloro
Aminde petala lekanteto.

Konvolvulo

Molaj formoj de via vizaĝo
Karesataj per miaj ĝemspiroj
Kiel nuboj en luma pejzaĝo
Kaptas miajn voluptajn dezirojn.

Arĝentaj ondoj de via voĉo
Varmege lavadas miajn pensojn.
Mian sangon koron ili kroĉos
Malsoifigante mian menson.

Mi ĉirkaŭkovros vian rondecon
Kiel karnmanĝema konvolvulo.
Mi ĝoje lekos vian spicecon
Per sperta lango de frandemulo.

Arbaro

Kristalan akvon mi ensorbadas
Kun radikoj de la sanktaj kverkoj.
Kun betulaj trunkoj mi staradas.
Sur blankaj ŝeloj mi skribas verkojn.

Mi trinkas lumon kiel folioj.
Mi naĝas tra miela aero.
Portata per kanto de tilioj
Mi fandiĝas en bera somero.

Mi ekdormos en faga ŝirmejo
Aceran susuron aŭskultante.
Mi prisonĝos transnuban irejon
Sur abia litaĵo glimante.

Ardo (Ĉinio)



brilantaj steloj

siblanta vento flustras amajn vortojn
lanternaj lumoj ne dispelis vintran froston

jen kelkaj florbutikoj sur la strato
 eligas la etoson de rozkolora romanco
 la koroj de enamiĝintaj homoj varmiĝas
 la poeto tre pasia
 rigardas supren al lunlumo neŝanĝita
 en malklare lumigita loko
 li serĉas frue perditan inspiron
 la amo estas tiel sankta
 belega kaj kortuŝa
 la longa rivero de la tempo
 konservas la neforgeseblajn memorojn
 mi rigardas supren al la ĉielo
 jen estas steloj en la ĉielo
 kiuj ĉiam brilas

la 14an de februaro, 2025

Kelly Muteke (D.R.Kongo)



Teritorio de la sango

Plu nenio restas por mi,
 Nun mi ne scias kien lumi.
 Ĉie estas larmoj sur vizaĝoj,
 Sen varmo mi restas en neĝo.
 Kiel rivero la sango fluas,
 Ne plu ĝojo, ne plu trankvilo.
 Senkonsolaj larmoj kaj timo,
 Kun la mizero min superas.
 Ĉie infanoj restas solaj
 Pro la teruraj masakroj.
 Patrinoj, virinoj, knabinoj –
 Viktimoj de seksperforto.
 Viroj – viktimoj de maljusto.
 Ĉi-flanke la sango fluas,
 Malamo transiras de loko al loko,
 La morto invadas la korojn.
 Kien ni iru, dum la sango
 Fluas en ĉiuj direktoj?
 Ĉu niaj praavoj eraris,
 Por ke ni heredu mizeron kaj timon?
 Silente potenculoj vidas murdojn.
 Mireginda afero! Ili subtenas ilin.
 Stranga estas la vivo ĉi tie,

Sed baldaŭ la vera justeco alvenos

La arto

La arto estas komunikilo
 Ĝi funkcias kiel pafilo
 Ĉiuj pafoj estas mesaĝo
 Ĝi parolas pro nia boniĝo

Sen ĝi la mondo estus tre kruela
 Per ĝi homoj lernas kiel Vivi .
 Per la arto homoj kuniĝas
 Ĉiuj uzas la arton laŭ vole

Per la arto mi sendas la pacan
 mesaĝon
 Al la mondo kiu plenas konfliktojn
 La arto estas bona komunikilo.
 Kiel Esperanto ĝi alportas la
 esperon.

Se ĉiuj uzus sian arton
 Por pli beligi la homan moralon
 La konfliktoj malpliĝus Sur la tero
 Kiel la ondo Sur la maro

Ni devas montri nian amon,
 Per la arto kaj la mondo boniĝos
 Mi invitas vin uzi vian arton,
 Por la paco kaj la futuro boniĝos.

Wélington Rocha (Brazilo)



Dankon Dio

Dankeme dankon amata granda ... Dio !
 Antaŭ via sanktega nomo ĝuindas ĉio !
 Dankon ke mi vekiĝis kun la povo vidi ,
 flari , aŭdi , gustumi , tuŝi . Vin fidi !
 Dankon pro la ĉiutaga sano ,
 specialan dankon pro la menso ,
 multan dankon mia Dio pro la pano !
 Dankon . Vi grandas ege pli ol penso !!!

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Insulo Timoro

*"La montoj estas tre kovritaj de
santal-arboj, ke oni hakas ĝin por
brulligno, kaj ĝia fortaodoro
kelkfoje malsanigas homojn."
(Tung Hsi Yang K'au, 1618)*

Insulo Timoro, insulo bela.
Tre fama estas via nomo
kiel santal-aromo tra insulo.

Estas menciita via nomo
de generacio al generacio,
de vilaĝoj ĝis urboj,
de montoj ĝis marbordoj.
Kiu ne scias vian nomon?

Dum sunleviĝo, vi brilas
kiel arĝento brilanta,
kaj kiam la suno subiras,
vi flaviĝas kiel oro brilanta.

Homoj de oriento, de okcidento,
de la suda sfero
ĝis la norda flanko
scias kiu vi estas.

Insulo Timoro, vi estas patrino
por ĉiuj viaj geposteuloj.
Preĝu por ke viaj geidoj
vojaĝu tra la mondo
kaj poste revenu
por laŭdegi vian nomon!
Ho Insulo Timoro, insulo bela,
insulo aroma.

Malgranda folio

Inter la multaj folioj de la arboj
kreskantaj en Via ĝardeno,

estas mi, malgranda folio,
kiun Vi gardas kun amo
kaj Vi donas al ĝi koloron
por ke ĝi havu veran formon.

Tage kaj nokte Vi gardas ĝin
kvankam ĝi estas nur folio
en Via ĝardeno tro granda.
Estas tre felice vivi ĉi tie
en la spaco nomata mondo
kiun oni konsideras paradizo.

Signifo de via rideto

Ho, viaj okuloj min rigardis
kiam mi ekskribis mallongan vorton
en lingvo, kiun vi neniam konis.

Vi min demandis pri kio mi skribis.
Kaj vi donis al mi tiun rigardon;
granda scivolemo ĝi signifis.

“Pri amo senlima”, mi diris.
Vi ridetis sed flustris nenion.
Interpreti tiun rideton mi ne povis.

Provi mian amon mi ege volis
sed ni ne havis plenan sezonon.
La luno kune kun vi malaperis.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Birdonupto

La nupton festas birdoparo
meze de l' arbaro.

Refr.: Fidiralala, fidiralala, fidirala-lala-la.

La gufo estas la fianĉ',
la strig' la fianĉin'.

Parigis la paruo,
ŝin svatis al la duo.

La cigno, la cigno,
jen staras kiel signo.

Ansero, ansero,
kunblekis kun fiero.

Kardelo, kardelo,
kondukas al kapelo.

La pego, la pego,
jam frapas ĉe l' pordego.

Pastoro akcipitro
demandas de l' pupitro.

La fringoj, la fringoj
atendas kun la ringoj.

Kolibro, kolibro,
flirtegas sur l' nuptlibro.

Alaŭdo, alaŭdo,
ĝi zorgas por aplaŭdo.

Strigpanjo, strigpanjo
plore gas pro l' infanjo.

Fulmaro, fulmaro,
gratulas al la paro.

La najtingal', la najtingal'
reĝine kantas en la bal'.

Kukolo, kukolo,
ĝi petas al dancsolo.

La struto, la struto,
paradas kun la fluto.

Pirola, pirola
vetkantas kun parvolo.

Kolombo, kolombo,

ĝi kveras en la rondo.

La kampokorv', la kampokorv',
atendas pri muzik' de Orff.

Vesperto, vesperto,
ĝi dormas dum koncerto.

Pingveno, pingveno,
kelneras kun sinteno.

La ruĝgorĝul', la ruĝgorĝul',
gustumis tro de l' alkuhuul'.

Paseroj, paseroj,
satiĝas de l' manĝeroj.

Koturno, koturno,
donacas kun la sturno.

Hirundo, hirundo,
hezitas jam de lundo.

La pigo, la pigo,
ĝi ŝtelas pro intrigo.


Papago, papago,
papagas pro la pago.

La festo, la festo,
finiĝas en la nesto.

Noktuo, noktuo
ululas por la duo.

La mevoj, la mevoj,
vojaĝas jam en revoj.

*(laŭ la ideo de germana popolkanto sed kun tute
propra teksto)*



Kalin Donkov

Neforgeso

Verŝu al mi vinon en glason fajnfacetan
kaj sidiĝu kun rideto neŝanĝebla.
Amato, vi verŝajne pravas,
la koro sian sorton havas.


Kaj iel al kutimiĝas la homo
krias en silento, silentas en eĥo.
Ĉu vi renkontos malhonoron aŭ gloron
ĉi-ekzamenon meritas la koron.

Kisu longe la gluton tiklan
la senmorta amo en ni viglas.
Vi ne povas longe, ĝis tomb almenaŭ,
la koro sian feston havu!

Na, na, na,, na, na.

Fore de vi aŭ kun vi eterne,
mi trankvile ĝisatendos ĉiun destinton
la koro ĉiun destinton meritas,
sed ne forgeson, sed ne forgeson
La koro ĉiun destinton meritas,
sed ne forgeson, sed ne forgeson.

Na, na, na, na, na.
tradukita el la bulgara lingvo



Lilia Nikolova

(Bulgario)

Lidija Leskur

Forto de fido

Fido estas la plej forta
Kun ĝi estas vi benita
Ĝi forlavas viajn pekojn
Kaj perdonas al vi ĉion

Neniu al vi egalas

Se vi havas tiun fidon
Sur vizaĝo via suno brilas
Vi ricevas novan forton

Rigardante homojn aliajn
Nur vi volas iom helpi
Por ili fari vian eblon
La forton de fido kundividi

Kiam vi maljuniĝos
Kaj veni volas al Dio
Neniam vi estos sola
Kun anĝeloj en ĉielo

Luca Cetinić

Maro en mi

Mi konas vin ekde mia naskiĝo:
El la fenestro kaj el la pordo
Kaj mi amas vin neeviteble
Kvazaŭ sangon de mia vivo.

Mi velkus, mi ja mortus
se vian muĝon mi ne havus
Se oni min movus, tuŝi vin povus
prudenton mian mi ne savus.

Vin ŝiras nord-kaj sudaj ventoj
Al mi la vivo branĉojn rompas
Se vi forestus abunde gutus
larmoj el mia okulo kaj mi miris.

Kiam forbrulos mia kandelo
cindron al vi mi testamentos.
Vi, maro, estas mia feliĉo
kun vi ĝis eterneco mi pentos.

Mi konas vin ekde mia naskiĝo:
kvazaŭ sango de mia vivo vi estas
vi lulas min en ĉiu konko
en ŝaŭmo de belo mi min nestas.

Mi ne navigas, ne ŝipas sur vi
nur nudan korpon mi malsekigas

sed mi feliĉas kaj provas vidi
per via ŝaŭmo mi mem beligas.

Songô kaj realo

Dum vespera vintra brilo
ripozis mi sub lankovrilo
kaj naghis inter songho kaj realo
tra la etera blua valo.
Dum vespera vintra brilo
mi navigis
al songhoj miaj
iomete venis al la viaj
sed io skuis min subite
kaj mi retrovis min enlite.

Venu

Venu, mi volas nur brakumi vin
Ritmon de steloj kuna vi spektadi
Venu, por ke miaj manoj
ne krii per malpleno
por ke mia koro ne batu per soleco
Alflugu min
Tra la fermitaj ŝutroj
Tra la makseka fenestra vintro
en larmon kiu fontas
por redoni al mi fuĝintan ĝojon
Alportu fontan feliĉon
Nur dum unu palpebrumeto.
Por ke ni kune fornavigu
degelintaj, lau la rivero de amo
lumigitaj per magio, mi kaj vi

Tradukis



Darija Budiša

(Kroatio)

Liu Weijie (Ĉinio)



**Najman-Flago*,
la hejmo en mia koro**

Najman-flago, mia kara hejmloko,

Via pejzaĝo bela, kiel pentraĵo, en mia koro
restas.

Kie ajn mi troviĝas,
La ombro de la stepo ĉiam min akompanas.

La tero vastas kaj floras mirakloj de la vivo,
La vento milde karesas vian vizaĝon,
kaj la subiranta suno farbas la teron orkolore.
La poezia stepo, trankvila kaj malproksima,
estas loko, kie mia animo ripozas kaj revas.

Najman-flago, poezia pentraĵo,
sur la verdaj kampoj ni renkontiĝu,
kaj niaj koroj strikte interligiĝu.
Ni brakumu la naturon kaj sentu nin liberaj
en eterna poezia etoso, malstreĉitaj kaj
memkontentaj.

Naiman-flago en mia koro
belas kiel poemo plena je profundaj sentoj.
La montoj kaj riveroj de mia hejmloko
estas senkompare grandiozaj kaj imponaj.
Kie ajn vi estas,
Mi ĉiam memoras vin en mia koro.

**Flago estas administra unuo de gubernia nivelo de
la aŭtonoma regiono de la Interna Mongolio.*

Postpluva Ĉielarko

Per varmaj manoj etendita al mi
vi forkaresas miajn vundojn tra la korpo.
Intertem[pe de flusoj kaj malflusoj
vi rivelas suferojn en mia sub la peza
vualo,
tiel ke miaj malĝojoj kaj ĉagreniĝo foriras
kun la vento,
kaj malaperis en sekreto ĉe la tempfino.

Vi foriris, silente, trankvile,
min lasante sola sub la serena ĉielo.
Mi petas, ke vi haltu plian momenton
kaj ni rigardu kune la bluan nubaron post
la pluvo.

Post pluvo suno ĉiam revenas,
post ŝtormo ĉiam aperas ĉielarko.
Viaj buntaj koloroj estas lumo de espero,
la plej bela pejzaĝo en la vivo kaj eterna
sopiro.

Larmanta ruĝa kandelo

Ruĝa kandelo larmas en silento
en ĉi nokta momento.
La senfina doloro
gravuriĝata en mia koro
neniel povas esti forigebla.

En la brulado
naskiĝas la amsento en nebulo
leviĝas en mincaj fumaj spiraloj,
kaj malaperas el la melankodiaj
okulanguloj.

Ĉi ĉio nur estas sonĝa sceno,
ama inko gutadas en ĉagreno.
La kandela larmo fluanta
ŝajne gravedas je nia etera sonĝo.
L sola Altaïro kuŝanta kviete
rande de frida galaksio
rigaras al mi de malproksimo.



Mi amas vin, Ĉinio!

Sur orienta tero vasta
staras lando antikva kaj majesta,
jen vi nomiĝas Ĉinio.

Tra viaj multkoloraj tradicioj,
ni ekkonas vian gigantan ŝanĝiĝon.
El viaj montoj kaj riveroj
ni sentas vian viglan pulson.

El meritoj de viaj revoluciuloj
ni lernas vian batalantan spiriton.
En via kvinmil-jara brila civilizacio,
Ni vidas vian grandiozan imponecon.

Mi amas vin, Ĉinio!
Ni estas viaj gefiloj, fieraj kaj
unuigintaj,
La kvinstela flago alte flirtas,
montrante la forton kaj unuecon de ni
kvindek ses etnoj.
Kun sento de paco kaj amo en nia
sango
kien ajn ni iras,
nia koro ĉiam ligiĝas
kun nia granda patrujo.

Ho, patrujo mia,
vi estas nia eterna fiero.
Vi, orienta drakego, strebas
flugi kaj flugi,
kun levita kapo,
al la nova epoko, al brila futuro.

Ĉinio, vi estas emociplena poemo,
kaj viaj historio kaj kulturo
plenplenas je saĝeco kaj forto
vi inspiras nin per bolanta sentimento.

Ĉinio, vi estas pentraĵo vivplena:
cent ŝipoj konkuras sur riveroj,
strebantaj al potenco kaj progreso,
al konstruado en granda bonordo.

Ĉinio, vi estas eterne ŝvebanta kanto,
vi vibrigas nian koron per belaj revoj.
Viaj ritmo kaj tono
al ni donas kuraĝon kaj esperon.

Ĉinio, vi estas brilanta stelo,
vi prilumas nian koron
kaj ĉiun angulon de la mondo.
Viaj lumo kaj forto
neniam malfortiĝus,

